# LA FERA LUPO

Redakcia retadreso: **ds@esperanto.lt; chtaesok@hanmail.net**
http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=jk

ĈIUTAGA INFORMILO DE TUTMONDA KONGRESO DE ESPERANTISTOJ-ĴURNALISTOJ **N-RO 2** | 2008 05 28, merkredo


## SOLENE INAŬGURITA LA KONGRESO!

Hieraŭ, la 27an de majo je la 10a horo ĉiuj partoprenantoj kolektiĝis en la ĉefsalono de la Malnova Urbodomo en la historia centro de Vilnius por inaŭguri la Tutmondan Kongreson de Esperantistoj-Ĵurnalistoj.

En la enkonduka vorto la prezidanto de la Organiza Komitato Povilas JEGOROVAS prezentis oficialajn gastojn kaj salutis la kunvenintojn.

Gratulparolis Juozas Imbrasas (urbestro), Faustas Latėnas (konsilanto de la litova ĉefministro), Dainius Radzevičius (prezidanto de Litova Ĵurnalista Asocio), Audrys Antanaitis (prezidanto de Litova Esperantista Ĵurnalista Asocio), Claude Nourmont (vicprezidanto de UEA) kaj Jukka Pietilainen (estrarano de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio).

Unuajn frazojn parolante en Esperanto, la urbestro deziris, ke la kongresanoj sukcese popularigu kaj disvastigu Esperanton, firmigu amikajn kaj reciproke fruktodonajn rilatojn.

Dainius Radzevičius promesis alian fojon paroli sian plenan parolon en Esperanto. Ni ĉiuj ja esperas, ke danke al la iniciatemo de litovaj esperantistoj kaj ĵurnalistoj revigliĝos la monda esperantista ĵurnalista agado.



**Surpodianoj de la kongreso**







**Faustas Latėnas, Dainius Radzevičius, Jukka Pietilainen (de maldekstere)**

**Partoprenantoj de la kongreso**






**La urbestro de Vilnius , Juozas Imbrasas ĉeestis la inaŭguron kaj gratule salutis la kongresanojn.**

# FOTORAPORTO DE LA HIERAŬO



Libroservo funkcias antaŭ la ĉefsalono de la Malnova Urbodomo.



Kongresanoj ekĝojis ĉe la unua numero de la kongresa ĉiutaga informilo "La Fera Lupo".



Longis tagmanĝo pro tro da kelerinoj nomitaj "Mokinė"(lernantino). Do okazis "Interkona Tago".



Fotoekspozicio de Andrzej Sochacki ĉe la ŝtuparo al la ĉefsalono.

Akcepto de la urbestro de Vilnius, Juozas Imbrasas (sube)



## OKAZIS PRELEGOJ



Hieraŭ post la inaŭguro okazis prelego pri la kongresa ĉeftemo. La kongrestema reĝisoro Humphrey Tonkin diris, ke esperantistaj ĵurnalistoj havas pli vastan mondkoncepton, pli profundan scion pri diversaj kulturoj kaj laborante sian laboron helpas nin defii la kulturajn antaŭjuĝojn per egaleca aliro al la homa problemaro.

Sekvis serio da prelegoj. Prelegis Audrys Antanaitis (*Amaskomunikado en Litovio*), Aleksander Korĵenkov (*Zamenhof kaj la gazetaro*), Stano Marček (*100 jaroj de la revuo Esperanto*), Petras Čeliauskas (*Kontribuo de Litova Stelo al formigo de bildo pri la lando*), Tomasz Chmielik (*Edmond Privat - la patro de la moderna Esperanto-ĵurnalismo*), Detlev Blanke (*Informado en lingvistikaj medioj*), Jukka Pietilaine (*Memreguligo kaj etiko en ĵurnalismo*).

Detlev Blanke en sia prelego diris, ke la kongreso certe levos la Esperanto-ĵurnalismon. Ni ja faru tiel.













## DIVERSAĴOJ

### „Esperantoland´“ - 400.000 kompakt-diskoj por pola publiko




Prezento de nova pretigata disko „Esperantoland´“, kiu aperos septembre kiel aldonaĵo al la tagĵurnalo „Gazeta Wyborcza“ en Pollando, okazos hodiaŭ - merkrede inter 12:25-12:55 en la salono de Sekcio Nr. 1 – anstataŭ la prelego de s-ro Laszlo SZŐKE.

Unu el la plej grandaj inform-kampanjoj rilate Esperanton realiĝos ĝuste danke al la urbo Bjalistoko. Kunlabore kun la tagĵurnalo Gazeta Wyborcza estos eldonita KD „Esperantoland´“, kiu aperos kiel aldonaĵo al la gazeto en eldono de 400.000 kopioj!

Kreadon de la disko pretigas E@I - internacia junulara organizo, okupiĝanta ĉefe pri retaj projektoj.


La disko estas plurmedia prezento de la lingvo Esperanto, kiu per luda formo informas pole kaj Esperante pri la lingvo, ebligas lerni ĝin, ludi, aŭskulti muzikon, spekti filmojn ktp.

Ĉu eble la projekto estus imitinda ankaŭ por aliaj landoj kaj lingvoj?

**Estraranoj de E@I:Jevgenij Gaus kaj Peter Baláž**

### Retejo http://filolingvia.com

La retejo aperigas artikolojn pri lingvoj, instruado kaj lernado de lingvoj. En ĝi estas rubrikoj: “Lingvo Esperanto” kaj “Novaĵoj de Esperanto”, en kiuj aperis pli ol 50 artikloj pri Esperanto kun multaj komentoj.



La retejo estas ruslingva, kvankam ĝi situas en Ukrainio, sed eblas aperigi artikolojn kaj komentojn en ĉiu ajn lingvo. En la menciitaj rubrikoj la artikoloj kaj komentoj aperas plejparte en la

rusa, Esperanto, angla kaj ukraina.

Principe eblas publikigi nelimigitan kvanton da artikoloj. Mi invitas ĉiujn kunlabori. Komenti artikolojn eblas sen registriĝo. En iu komento oni povos peti registriĝon kaj memstare aperigi artikolojn.

Se vi demandas per Google en la rusa lingvo "lerni Esperanton,", "lerni lingvojn", "lerni la anglan", la ligilo al http://filolingvia.com aperas jam en la unua paĝo.

**Vladimir Minin (Usono) mininvl@yahoo.com**

## Reta televido en Esperanto



La teamo de bjalistokaj esperantistoj kune kun la reta televido ITVC decidis lanĉi novan projekton pri la Esperanto-programo en reto el Bjalistoko. Ni komencis la 2an de majo per la emisio de 10-minuta programo kaj ni planas aldoni novajn elsendojn ĉiun duan semajnon. Por ke tiu ĉi programo ne restu nur la informo pri la lokaj okazintaĵoj, ni bezonas vian kunlaboron.

La reta televido ne postulas altkvalitajn materialojn kaj mi estas absolute certa, ke vi sukcesos fari 2 aŭ 3-minutajn filmojn kun la esperantlingva komentario kaj sendi ilin per la ordinara poŝto al Bjalistoko.

La temo ne gravas. Spektu komence niajn unuajn elsendojn en http://www.itvc.pl, kaj aliĝu al la grupo de la programkreintoj. Kvankam mi ne certigas al kunlaborantoj honorarion. Mi supozas, ke por multaj la ebleco prezenti siajn kontribuojn en la bjalistoka ITVC donos al vi la ŝancon profundigi spertojn pri la esperantlingva ĵurnalismo.

**Ela Karczewska**

## Industria arĥeologio

Por VVIA (Belgio, http://www.vvia.be) kaj E-FAITH (la eŭropa kupola organizo, http://www.e-faith.org) mi serĉas kontakton, precipe en baltaj landoj, kun personoj, kiuj interesiĝas kaj/aŭ kapablas raporti pri industria arĥeologio (tio estas la konservado kaj reuzo de industriaj maŝinoj kaj konstruaĵoj ne plu uzataj).

**Roland Rotsaert, rotsaert@esperanto.be**

## Ĉu vi jam gustumis litovan manĝon?

Litovion vizitis iuj plurfoje, dum aliaj unuafoje. Ĉu vi jam gustumis litovajn manĝojn? Jen ni rekomendas al vi cepelinojn (cepelinai en la litova) kaj malvarman barĉon (šaltibarščiai en la litova). Cepelino estas terpomaĵo interne kun muelita viando, kazeo aŭ fungo, kaj barĉo estas supo farita el ruĝa beto, freŝa kukumo, kuirita ovo kaj acida lakto. Vi ne gustumus korean manĝon sen kimĉio, nek litovan manĝon sen cepelino. Iu nelitova kongresano ĉe la tagmanĝotablo rakontis pri sia bona manĝado de cepelino, atendante kafon dum longega tempo.





## Preseraro en la Kongresa Libro

En paĝo 117
**Svedio**; retadreso de Kaisa Hansen devas esti kaihan@bredband.net;
tiu de Ole Hansen devas esti ole@bredband.net

## El la redakcio

La redakcio kolektas viajn kontribuojn per retadresoj: **ds@esperanto.lt;chtaesok@hanmail.net** aŭ pere de organizantoj aŭ persone. Lia ĉambronumero de *Ecotel* estas 233; lia poŝtelefono: +370 6861 3453. La redaktoro klopodos esti surloke dum kongresaj laboroj. Ĉi tiun numeron redaktis *CHOE Taesok, Vida ČOJIENĖ, Sang Sup JUNG*.

Viaj raportoj, anoncoj kaj similaj por la venonta numero estu transdonitaj al la redakcio plej malfrue **je la 14a horo de la kuranta tago**.

Anticipan dankon pro via kunlaboro.